

# TEA-BULTENO

8A JARO — SEPTEMBRO - OKTOBRO 2005 — NUMEROJ 9-10

KONGRESO de ESPERANTO 90a UNIVERSALA VILNIUS 2005

## Post UK...

dum multaj jaroj estis mia kutimo, raporti, diskonigi miajn spertojn, rakonti la travivaĵojn, priparoli la UK-programerojn ktp. Ĉifoje mi rompas tiun rutinaĵon, kaj anstataŭ mia voĉo, vi aŭdos tiun de

### Unuafoja UK-anino: Egle Mongiello

Mi, unuafoje, partoprenis Universalan Kongreson! Tio okazis julie en Vilno. De la pasinta jaro mi atendis tiun grandan eventon kaj finfine la forirtempo alvenis kaj kune kun aliaj samideanoj mi flugis al la litova ĉefurbo.

Vilno bonvenigis nin nokte per pluvo, sed ĉe la flughaveno LKK-anoj akceptis nin kaj donis al ni varman bonvenon. Mi ĉeestis la kongresan malfermon: dum la solena inaŭguro mi tre ĝuis la belan himnon kaj la plaĉajn salutojn de la diverslandaj reprezentantoj kaj ankaŭ la parolojn de d-ro Zamenhof, kiujn diris lia nepo, s-ro Zaleski Zamenhof, cent jarojn post Bulonjo ĉe Maro. Ankaŭ nacian vesperon mi ŝatis: litovoj faris defilon de naciaj kostumoj (iom longan!) kaj aranĝis popolajn dancojn kaj muzikajn pecojn pere de antikvaj lignomuzikiloj. Mi spektis koncertojn, prozajn spektaklojn ... sed pri la kongreso mi trovis min tute konfuzita! Mi rigardis en la kongresa libro la tagprogramerojn, sed estis malfacile por mi bone elekti, ĉar samtempe okazis pluraj prelegoj pri malsamaj temoj: do, mi elektis tute hazarde! Fakte mi elektis programojn pri vampiroj, SAT, Oomoto ktp. Se mi havus antaŭe ĉi libron, mi povus elekti pli bone.

Mia celo estis malligi mian langon, ekparoli pli flue, kaj ankaŭ aŭskulti gravajn verkistojn, precipe por aŭdi diferencajn prononcojn, laŭ devenlando. Pro tio mi partoprenis la konversaciajn rondojn, sed troaj estis la partoprenintoj kaj do, malmulte, mi faris, plie la kursoj egalis kaj por komencantoj kaj por meznivelaj homoj. Ŝajnas al mi, ke mi ne bone profitis de tiu ĉi kongreso, bedaŭrinde! Dum ĝi mi sendis al miaj geamikoj kaj al mi mem multajn bildkartojn, ĝuste por ricevi la specialan porokazan stampon: ankaŭ tio ne glate iris, ĉar ni ricevis tute ordinaran litov-poŝtan stampon.

Post la kongreso ni ekskursis tra la lando, vizitante plurajn urbojn: Trakai, Kaŭnas, Siauliai, Klaipeda kaj la duoninsulon Neringa. Mi malkovris landon al mi tute nekonata, riĉa je arbaroj, riveroj, lagoj. Mi malmulte vojaĝis ĝis nun, do certe ĉi tiu sperto utilos por miaj estontaj ĉeestoj en kongresoj. Nu, ĝis... la venonta!

### *Okazis dum Vilna UK...*

"Ĉu vi parolas esperanton ?"
"Jes, certe"
"Ĉu ankoraŭ ekzistas esperanto?"
"Jes, kial vi demandas tion?"
"Ĉar dum dudek kvin jaroj mi ne plu aŭdis paroli esperanton kaj pri esperanto..."

Litovdevena sinjorino nun loĝanta en Usono surprizis nin promenantajn tra Vilnius. Post amuza babilado ŝi resurprizis nin, vizitante la kongresejon.

Ŝi entuziasme babilis, aĉetis librojn, partoprenis prelegojn, renkontis malnovajn amikojn, fakte denove ŝi ĝuis mergante sin en esperanta medio kaj etoso.

Ĝis revido en Florenco, nova amikino Maritten.

*Maria Grazia kaj Danilo*

## Septembra Programo

| | |
|---|---|
| 02 - vendredo | 20.00 - Unua postferiada Kunveno |
| 06- mardo | 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 09 - vendredo | 20.00 - Eminentuloj el nia movada historio: Valdemar LANGLET |
| 11 - dimanĉo | Festo de Amikeco sur Monto Forno |
| 13 - mardo | 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 16 - vendredo | 20.00 - *Lecturae Dantis* en Esperanto |
| 20 - mardo | 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 23 - vendredo | 20.00 - Aŭtuno, preskaŭ vintro |
| 27 - mardo | 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 30 - vendredo | 20.00 - Ĉu vi konas Trieston? Ekskurso en la pasinteco pere de bildkartoj! |

## Oktobra Programo

| | |
|---|---|
| 04- mardo | 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 07 - vendredo | 20.00 - Terminoj en kuirejo |
| 11 - mardo | 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 14 - vendredo | 20.00 - Ni provu interpretadi! |
| 18 - mardo | 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 21 - vendredo | 20.00 - Memore de Aldo VIOTTO, elstara triesta esperantisto |
| 25 - mardo | 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo |
| 28 - vendredo | 20.00 - Litovio, lando de la 90a Universala Esperanto-Kongreso *(diapozitivoj)* |

**Fine de septembro/komence de oktobro startos unua- kaj dua-gradaj kursoj (informoj ĉe Elda), dum la Koruso VERDAJ ANĜELOJ ekos sian ekzercadon post interkonsento kun ties direktorino Devana.**

**Rean Bonvenon en TEA kaj Fruktodonan Laboron!**



Kunlabore kun CENTRO SERVIZI VOLONTARIATO FRIULI VENEZIA GIULIA

## Esperanto-Ligo Filatelista — Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

UK kutime estas tre grava ankaŭ kiel renkontiĝejo por filatelistoj-esperantistoj, kiuj dum tuta jaro komunikas nur perpoŝte aŭ rete aŭ telefone, kaj tre malofte havas la ŝancon intervidiĝi, por povi tiel plani, en komuna kunvenejo, la estontajn asociajn agadojn. Ĉijare en Vilnius ĉirkaŭ 15 filatelistoj ariĝis en la teretaĝa kafejo de Kongresejo. La prezidanto de ELF-AREK, s-ro Hermann Heiss, enkonduke raportis pri celoj de la asocio, parolis pri ties servoj kaj agado dumjara, reliefigante la gravecon de ĝia ekzisto por disvastigo de Esperanto en neesperantistaj filatelaj rondoj tra la mondo.

ELF-AREK estis fondita oficiale en 1968, ĝia organo estas LA VERDA LUPEO, kiu nun estas redaktata de Rudolf Burmeister. Per tiu gazeto membroj estas informitaj pri laste eldonitaj filatelaĵoj aŭ esperantaĵoj, ekscias pri la aktivado de la aliaj membroj (precipe rilate al ilia partopreno en naciaj aŭ internaciaj ekspozicioj), aŭ, danke al interesaj artikoloj pri malnovaj, frutempaj aperintaĵoj, plejparte el la komencaj jaroj de la pasinta jarcento, konatiĝas kun historio de nia lingvo pere de bildkartoj, glumarkoj, stampoj ks. Ekzistas krome granda Katalogo, en kiu estas enlistigitaj, kune kun koncernaj fakaj klarigoj, ĉiuj poŝtmarkoj, stampoj kaj afrankostampoj, tutaĵoj, glumarkoj, bildkartoj ktp ekde la unuaj jaroj de Esperanto. Ĉi tiun grandan laboron plene faris la Honora Membro de UEA Richard Hirsch kaj nun ĝin daŭrigas la redaktoro de LVL.

Por efika agado kaj sinsekva ĝisdatigo de la Katalogo nepre bezonata estas la konstanta informado pri Esperantaĵoj, aperintaj kie ajn tra la mondo, pri kiuj ĉiu ajn povas kunlabori, simple sendante la koncernan sciigon al la redaktoro aŭ prezidanto de la filatelista asocio.

Aparte grava por la pasiaj kolektantoj estis la ĉijara UK, ĉar tie abundis filatelaĵoj!

En 300 mil ekzempleroj aperis poŝtmarko, kun valoro de unu lido: sur ĝi portreto de Zamenhof kaj emblemo de la jubilea UK. Ĝia aŭtoro estis la litova pentristo K.Katkus. La Ŝtata entrepreno *LIETUVOS PASTAS* eldonis t.n. UnuaTagan Koverton (UTK), sur kiu estas presita fotaĵo de monumento al Zamenhof en Veisiejai kun koncerna subskribo kaj surgluita la kongresa poŝtmarko, kun la stampo. Plie aperis "suvenira filatela folio", nome faldebla folio je bildkarta formato. Sur la frontpaĝo pentraĵo de Zilbernik-Domo en Kaunas, nuna sidejo de Litova Esperanto-Asocio, sur interna paĝo tro-viĝas trilingva (litova, Esperanto, angla) kelkfraza teksto pri UK, dum sur la alia interna paĝo estas gluitaj du kongresaj poŝtmarkoj, el kiuj unu kun la kongresa stampo. Krome estis eldonitaj diversaj bildkartoj kaj kovertoj kun emblemoj de kongreso ks.

Gratulegojn al la organizintoj pro la grandiozaj atingoj en filatela kampo!!!

Por interesitoj kaj por tiuj kiuj deziras pliajn informojn pri ELF-AREK, jen retadresoj de redaktoro de LVL kaj de la vicprezidanto: Rudolf Burmeister: laomei@ardcor.de; Elda Doerfler: testudo@adriacom.it. Pri poŝtaj adresoj, vidu la Jarlibron.

## Konkurso por geknaboj

TRIESTA ESPERANTO ASOCIO, enkadre de vasta aranĝo, kies temo estas

### LA KRISTNASKA KRIPO, HIERAŬ KAJ HODIAŬ



realigota en la venonta decembra monato 2005 kaj antaŭvidanta ekspozicion kaj prelegojn pri kripoj, starigas konkurson por geknaboj, aĝantaj inter 6 kaj 14 jaroj.

Ni invitas vin, diskonigi ĝin, kiel eble plej multe, inter lernejanoj, filoj, nevoj, nepoj, ktp: ne gravas, ke partoprenontoj estu bonaj konantoj de Esperanto - vi ja povos ilin helpi, ĉu ne? Via kunlaboro estas nepre necesa por la sukceso de la manifestacio, per kio oni celas atentigi la eksteran publikon pri la tutmonda disvastigado de nia lingvo kaj plie kiel ĝi povas esti praktika perilo inter diversaj kulturoj. Korajn dankojn pro via helpo!

*Elda Doerfler - testudo@adriacom.it*

Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj devus sendi, **ĝis la 5a de novembro 2005**, siajn laboraĵojn al la jena adreso:

ESPERANTO TRIESTE - C.P.601
IT-34100 TRIESTE CENTRO - ITALIA

Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da faritaĵoj pri la supre indikita temo, en la sekvaj formoj:

- fotografaĵo (ekz. de hejma aŭ lerneja, aŭ de preĝeja kripo) en grando maksimume de A4-formata folio;
- desegnaĵo (ekz.: "kiel mi vidas hodiaŭ la kripon", "kiel mi ŝatus ĝin", ...)
- teksto, skribita sur maksimume unu A4-formata folio (ekz.: malgranda rakonto pri kripo, pri la naskiĝo de Jesuo, kristnaska fabelo, ...)
- manfaritaĵo (el gipso, ligno, metalo aŭ el papero, aŭ el iu ajn alia ŝatata materialo)

La teksto estu en la internacia lingvo esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtoro, kaj ĉiuj aliaj faritaĵoj estu akompanataj de frazo aŭ komentario en ambaŭ lingvoj. Krome estu ankaŭ indikitaj:

- persona kaj familia nomoj;
- aĝo;
- lernejo kaj klaso;
- poŝta adreso.

Tre bonvenas malgranda foto de la aŭtor/in/o.

Ĉiuj faritaĵoj prezentiĝos al publiko dum la kristnaska periodo 2005, je fiksota dato.

Oni anoncos la premiitojn, pro la plej trafaj faritaĵoj, laŭ speco kaj aĝo (Kat. A: de 6 ĝis 8 jaroj; Kat. B: de 9 ĝis 11 j.; Kat. C: de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Trieste.

Por kromaj detaloj/informoj: noredv@tele2.it aŭ testudo@adriacom.it aŭ la supre indikita adreso de Esperanto Trieste. Telefonnumeroj: +39 040 398562 (Elda); +39 040 350093 (Edvige).

## ATENTU! ATENTU!

**Limdato estas prokrastita ĝis la 5a de novembro**: do, vi havas iom pli da tempo, sed ne hezitu! Bonvolu tuj aktiviĝi por ĝustatempa partopreno en la konkurso! Dankon pro via kunlaboro!

## 6-9 Aŭgusto.

**NENIAM plu Hiroŝimo! NENIAM plu Nagasako!**

- **Sesdek jarojn post la unuaj atombomboj**
- ***Mesaĝo de la urbestro de Hiroŝimo sendita pere de Esperanto kiel ponto-lingvo***

Memorigo antaŭ la kradpordoj de la USAF-bazo en Aviano *(ndr: en regiono Friulo-Julvenetio, apud Pordenone)* – kunlige kun iniciatoj samtempe okazantaj en Belgio, Germanio, Britio, Usono kaj aliloke – konkludis marde la $9^{an}$ de aŭgusto vicon da manifestacioj, kiujn asocio *BEATI I COSTRUTTORI DI PACE* (Feliĉaj estu la packonstruantoj) kunordigis je la $60^{a}$ datreveno de la surĵetado sur Japanion de atombomboj.

Post memorigo de la unua atomatako detruinta Hiroŝimon, sabate la $6^{an}$ de aŭgusto, je la 8.15 h matene, antaŭ la armea flughaveno en Ghedi (Brescia), posttagmeze en Padovo, estis inaŭgurita signifoplena fotoekspozicio: "Neniam plu Hiroŝimo! Neniam plu Nagasako!"

La sekvan tagon, posttagmeze, sub la Loĝio de Granduloj, okazis komuna preĝo por paco kaj kontraŭ nukleaj armiloj fare de malsamaj religiaj konfesioj kun legado de la preĝo PATRO NIA ankaŭ en esperanta versio, dum s-ino IKEDO Seika la ĉeestantojn kortuŝis per sia emociveka atesto de "hubakŝa" t.e. la postvivinto de la nuklea eksplodo. Fokuspunkto estis la tuttaga kunveno "For la atomarmilojn!", okazinta lunde, la $8^{an}$ de aŭgusto ĉe salono *Paladin* de Palaco *Moroni*, kun elstaraj intervenoj de scientistoj, parlamentanoj kaj aliaj gravaj aŭtoritatuloj.

Ĉiuj eventoj enkadriĝis en la "Kampanjo Tutmonda por Forigo de Nukleaj Armiloj", kiun iniciatis la Urbestro de Hiroŝimo, AKIBA Yadatoshi. Lia alcela salutmesaĝo – laŭtlegita al la ĉeestantaro – sendis al la itala grupo ESPERANTO SOCIA FORUMO la esperantistoj de Hiroŝimo, kiuj utiligis kiel ponto-lingvo Esperanton, neŭtralan kaj egalecan idiomon, do, tute respondan kaj oportunan en tiu ĉi cirkonstanco.

**Jen la teksto de l' mesaĝo:**

Al "6-9 DE AŬGUSTO: NENIAM PLU HIROŜIMO! NENIAM PLU NAGASAKO!" 2005.08.06 - AKIBA Tadatoshi, Urbestro de Hiroshima, Japanio

"'' Okaze de ĉi tiuj kunvenoj, mi sendas mesaĝon al vi. Sur prapunkto de sperto atombombita antaŭ 60 jaroj, Hiroshima daŭre apelaciadas nuligi nukleajn armilojn kaj realigi eternan mondpacon. Sed, ĉeno de malamo, perforto kaj venĝo en diversaj lokoj en la mondo restas ne interrompita, kaj ankoraŭ nun ekzistas multenombraj nukleaj armiloj sur la terglobo, eĉ kreskas ebleco de uzo de nukleaj armiloj.

Elkore mi petas al vi, ke ankaŭ de nun memoro de Hiroshima restu en via koro, kaj kune kun ni strebu kaj agadu por realigo de la mondo sen nukleaj armiloj, por la mondo emancipita de malamo kaj teruro.

Laste, mi preĝas sukceson de la ĉenaj kunvenoj, kaj sanon de vi ĉiuj partoprenantoj. ''"

**Esperanto, lingvo de interkompreno kaj paco, ankoraŭfoje ludis gravan rolon kiel peranto de sentemaj vortoj, okaze de signifoplena evento.**

*Raportis Viglo*

Nekredeblas: alvenis reagoj al la problemo,

## OK OR-MONEROJ

proponita de s-ro Bardhyl Selimi kaj aperinta en la junia TEA-Bulteno! Jen la nomoj de la du aŭdacaj solvintoj kiuj meritoplene ĝuos la premion (KD pri Triesto):

**Norberto Diaz Guevara el Sancti Spiritus (Kubo) kaj Christian Cimpa el Vieno.**

Al ĉiuj aliaj, kiuj maltrafis ĉi eblecon, la solvon pri disdivido inter la du disputantoj tamen mi donas:

**7:1**

Kial, do? Ni dispecigu ĉiun panon en tri partojn. Do, entute estas 8x3=24 partoj, el kiuj po ok partoj manĝis ĉiu el la tri araboj. La unua ricevis 5x3=15 partojn el kiuj li mem konsumis 8, kaj restis 7. La dua havis 3x3=9 partojn el kiuj li konsumis 8, do restis al li unu parto. La restantajn partojn oni donis al la tria persono, do la unua donis 7 kaj la dua donis unu. Tia devas esti ankaŭ la distribuo de la ok ormoneroj.

Gratulojn al la sukcesintoj kaj ĝis la venonta problemo!

## *Triesto kaŝita*

### *Malkovru nekonatajn erojn de nia urbo!*

### ***Johanĉjo de la Ruĝponta Placo***

Tronas ĉe la placo la fontano nomata Johanĉjo (*Giovanin*), verko de la skulpisto *Francesco Mazzoleni*, datita 1751.

Krom tio kreis *Mazzoleni* la fontanon de LA KVAR KONTINENTOJ, ĉe placo de Itala Unuiĝo (1750). Li mortis en mizero ĉar, laŭ scio, neniam oni likvidis lian laboron, kiel atestas liaj petleteroj konservataj ĉe Ŝtata Arkivo.

La etuleton, aŭ riveran genion *(ndr: diaĵo, kiu zorgas pri la destino, bona aŭ malbona, de ĉiu homo – PIV, pĝ 389)*, en elstara pozicio sur la bela skulptaĵo, baptis *Johanĉjo* la popolaj legomvendistinoj, pasintjarcente, kaj je la datreveno de Sankta Johano oni ĝin eĉ kovregis per floroj. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj, dum Karnavala periodo, oni eĉ vestmaskis ĝin.

Sur mano de Johanĉjo, en foraj tempoj, sed precipe inter 1850 kaj 1890, anonima urbano pendigis afiŝon surhavantan ŝercan aŭ spican komentarion pri iu tiutempa aktualaĵo, plej ofte politika.

Pro tio la rivera elfeto fariĝis rivalo de la fama *PASQUINO* en Romo.

*3ESTULO*



## Dimanĉon la $11^{an}$ de septembro
## Festo de Amikeco ĉe Dreiländerecke

La tradicia renkontiĝo sur Monto Forno estas jam proksima: ĉu denove ni surgrimpu tiun altaĵon, por vagadi de unu lando al alia, ĝui belan naturon, gustumi aŭstrajn, slovenajn aŭ italajn manĝaĵojn, kunveni kun esperantistoj?

Se jes, vi estas varme invitata tuj anonci vin por planado de kunvojaĝo ĉe TEA-sekretario; telefone: sideje 040 763128 (marde kaj vendrede - 19.30-22.00), hejme 040 398562 aŭ rete: testudo@adriacom.it.

## Post 50 jaroj

En 1905 okazis en Boulogne-sur-Mer la unua Universala Kongreso, mejloŝtona etapo, kie unuafoje oni testis la efektivan lingvo-funkciadon. Post 50 jaroj, en 1955, 1687 samideanoj partoprenis en la 40ª UK en la itala urbo Bologna, kies nomo similas al tiu de la unua UK. Inter la du eventoj, du mondmilitoj skuis la tutan mondon, kaj la Esperanto-movado estis forte batita pro tiuj, sed malgraŭ ĉio, ambaŭfoje ĝi sukcesis leviĝi kaj antaŭeniri. Tiam, en Bologna, aktivadis grupo tre vigla, konsistanta el nombraj junuloj kunlaborantaj kun la veteranoj. Post organizado en 1952 de nacia kongreso, oni elane alpaŝis por alfronti grandan defion: organizadon de monda kongreso. Grandioza la laboro, alfrontita kun granda entuziasmo kaj kronita per mirinda rezulto.

Kaj nun, 51 jarojn post tiu de Bologna, tutmonda esperantistaro kongresos denove en Italio, en Florenco, de la 29ª de julio ĝis la 5ª de aŭgusto 2006. Florenco ĉiam allogas homojn el la tuta mondo, tial la itala esperantistaro havos antaŭ si gigantan taskon, kaj jam nun oni devas eklabori por sukcese ĉion fari. La farenda laboro estas tioma, ke florencaj aŭ tuskaniaj esperantistoj ne solaj povas ĉion superi: ili bezonas kunlaboron de la tutlanda samideanaro.

Estos bezonataj personoj por akceptado de kongresanoj ĉe alvenejoj kaj kongresaj giĉetoj, turismaj gvidantoj por ekskursoj kaj urbaj vizitoj, tradukantoj kaj interpretantoj por la diversaj kunvenoj kaj rondotabloj, kiujn ĉeestos italaj gastoj neesperantistaj (politikaj aŭtoritatuloj, naciaj kaj lokaj, invititoj, ĵurnalistoj ks.). Estas bezonataj personoj kapablaj bone mastri komputilojn, por la enskribiĝoj, hotelaj kaj ekskursaj mendoj, ktp.

Ĉiuj italaj grupoj povas jam nun komenci labori, organizante perfektigajn kursojn, precipe por la neoftaj vizitantoj de internaciaj kunvenoj. Kiuj deziras kunlabori, kontaktu la organizan komitaton

**congresso2006.coordinamento@esperanto.it**,

aldonante kelkajn personajn informojn (aĝon, lingvonivelon, lernejan diplomon, eventualajn specifajn kapablojn aŭ fakojn, eĉ artajn, teatrajn ks).

*Laura Brazzabeni uk2006.informoj@esperanto.it*

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste
**tel/fakso**: +39 040 763128
**Reto**: esperantotrieste@adriacom.it; noredv@tele2.it
**http**://arte.triesteincontra.it/esperanto
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349





## TABULEO KUN TINUSO

Tre populara en Libano, *TABULEO* estas refreŝiga salato el kuskuso*, spicita per specialaj aromherboj, kiu akompanas kaj viandon kaj fiŝojn.

(El la ĵurnalo "TIMES" - Londono)

***INGREDIENCOJ (4 SAMTABLANOJ)***

| | |
|---|---|
| 150 gr | da kuskuso |
| 300 ml | da bolanta akvo |
| 2 | ruĝaj cepoj |
| 1 | kukumo |
| 2 | tomatoj |
| 1 | granda garbo da petroselo |
| 1 | garbeto da mentofolioj |
| 1 ½ | kulereto da muelita kumino |
| 4 | malgrandaj tranĉaĵoj de freŝa tinuso |
| 3 | kulerplenoj da olivoleo |
| 2 | kulerplenoj da lemonsuko |
| | salo k pipro |





***PREPARADO***

Metu la semolon en grandan pelvon kaj surverŝu ĝin per la bolanta akvo. Miksu kaj lasu ĝin ripozi ĝis ties pufiĝo (ĉirkaŭ 15-30 minutojn).

Aparte haketu la cepojn, la sensemigitan kukumon, petroselon kaj mentofoliojn. Senigu je semoj kaj suko la du tomatojn kaj ilin haketu.

Senakvigu la semolon, ĝin elpremante. Kondimentu ĝin per la herboj, cepoj, kukumo, tomatoj, lemonsuko, plus 2 kulerplenoj da oleo, salo kaj pipro.

En telero miksu kuminon kun salo kaj pipro kaj per tiu miksaĵo frotu ambaŭflanke la tranĉaĵojn de tinuso. Ilin per unu kulerpleno da oleo kuirpreparu sangoriĉe, poste dishaku kaj miksu ĉion kun tabuleo.

Surtabligu la manĝaĵon freŝa.

* Speco de malfajna semolo vaporkuirita. (PIV, 643, 1)

**Iuj Inform-artikoloj fontas el RET-INFO, NUN kaj NOVA SENTO.**

